
# HEJS JUNECO 1887 · 1987

Hispana Esperantista Junulara Societo (H.E.J.S.)

JUNULARA SEKCIO DE H· E· F· - LANDA SEKCIO DE T· E· J· O·




## en ĉi numero...

.ĉio pri la lasta renkontiĝo en madrido: hejs'87.

.iom pri la junulara restadejo en monistrol (barcelona)

.kiel funkcios la eldonoj de hejs.

.atomo kaj s.k.e.g.: la movado vekiĝas en katalunio.

.spritaĵoj, rebusoj, ludoj...


HEJS-JUNECO
eldonas: hejs.
redaktoro: jesuo armengol (katalunio).
kunlaboras:
carmen teruel
nuri martínez
anna pedrola
joan felip artero

majo-87
nro. 129

# notu bone

H.E.J.S. (Centra Oficejo)
Hispana E-ista Junulara Societo
Sol,75
41003-SEVILLA
Andaluzio
Tfno.(954)415991

.Madrida Oficejo ĉe
Madrida Esperanto Junularo
.Barcelona Oficejo ĉe
Atomo

(ambaŭ adresoj aperas ĉi-sube)

HEJS-Juneco
Jesuo Armengol (red.)
Fco. Moragas, 95.3-2
08922-STA.COLOMA DE GRAMENET
Katalunio
Tfno.(93)3865533

LA MANO
Georgo Camacho (red.)
Atocha, 98.4º
28012-MADRID
Madrid
Tfno.(91)2308798

## FEDERACIIĜINTAJ ASOCIOJ

-Andaluzio

Andaluzia Esperanto Junularo
Apdo. 611
14080-CORDOBA

Komitatano A
José Mª Rodríguez Hernández

-Katalunio

Atomo
Carreras Candi, 34-36
08028-BARCELONA

Sankta Kolomba Esperanto Grupo
Sant Josep, 20
08922-STA.COLOMA DE GRAMENET

Komitatano A por ambaŭ Jesuo Armengol Arbiol

-Madrido

Madrida Esperanto Junularo
Atocha, 98. 4º
28012-MADRID

Komitatano A
Georgo Camacho Cordón

-Aragono

Junulara Esperantista Societo Aragona
Apdo. 149
50080-ZARAGOZA

Komitatano A
Juan Carlos Nuño Casión

HEJS TENAS KONTAKTOJN POR FEDERACIIĜO KUN:
-Vitoria Esperanto Grupo(ĉe Rafa Blanco) Pza.Zaldiarán,1.6º 01008-GASTEIZ
-Valencia Esperantista Junulara Asocio Antonio Machado,6 46380-CHESTE

# por kiu ankoraŭ ne konas nin



salutom geuloj! mi estas nun, de nia revuo, la nova redaktoro. mi esperas ke vi ĝuos la novan hejs-junecon. ne forgesu sendi vian kunlaboraĵojn ofte kaj akurate.
ha, mia nomo: jesuo redaktoris



jen nia kara sekretario franciskis antunezikis. en sia kaldrono li preparas la eliksiron de la laboro. li estas kvazaŭ nia paĉjo, kontrolante ĉion.



georgis kamaĉiks estas la redaktoro de la nova revuo de hejs "la mano" ĝi estos nur kultura kaj ne primovada. ni fieras ke georgis estas unu el niaj plej altkvalitaj verkistoj. bravo... bravo...!



jen specimeno de niaj membroj. li estas tute feliĉa homo. nur pagante malaltan kotizon ĉiujare, li partoprenas senpage niajn renkontiĝojn kaj ĝuas niajn mirindajn revuojn. li estas bonŝanca. li estas hejs-membriks



albertiks la sovaĝa de hejsujo! li estas nia respektoplena prezidanto, (ĉu ne?) ektimu kontraŭhejsistoj! li estas la gardisto de la nova hejs

longa vivo al nia prezidanto!!!

# HEJS VEKIĜAS EN KATALUNIO

## ATOMO

temas pri la junulara sekcio de barcelona e-o centro. fakte la grupo nun estas formata de tre malmultaj homoj sed ni esperas ke baldaŭ tiu grupo fariĝos multe pli granda tial ke, la e-o kursojn en ni sidejo partoprenas multaj gejunuloj.

ĉefa tasko de atomo estas la propagando. dank'al la bona desegnarto de joan felip artero, jam aperis pluraj afiŝoj por e-o kaj kontraŭ la imperiisma angla lingvo.

alia grava tasko de atomo estas la kontraŭstaro al la internacia armado kaj eksterlandaj kazernoj en hispanio, la postulo de konsciencobĵetado kaj la defendo de pli verda kaj ekologia sistemo en nia tero. por tio ni agas partoprenante manifestaciojn kaj kontaktante kun organizoj rilatantaj al tiu afero.

nun plej grava por atomo estas jam prepari kune kun skeg la venontjaran hejs renkontiĝon en monistrol.

atomo estas federaciiĝinta asocio al hejs kiel loka organizo, kaj ni estas pretaj al kunlaboro kun aliaj junularaj grupoj en hispanio aŭ eksterlande.

## SKEG

ĝi estis de antaŭ multaj jaroj la e-o fako de la ekskursa centro puigcastellar en santa coloma de gramenet. ĉi-jare ĝi fariĝis junulara grupo federaciiĝinta al hejs kiel loka organizo.

ĉiujare preparas kursojn, malgraŭ tio ke nuntempe nur okazas meza kurso. dank'al bonaj rilatoj kun urbestraro ni sukcesis ĉiam havi ĝian helpon. lastatempe ni eldonis triptikon pri nia urbo en katáluna kaj esperanta lingvoj. ni ofte preparas festojn kiam iu eksterlandano vizitas nin.

nuntempe ni laboras en iom komplika afero: la preparo de videobendo informante pri e-o por prezenti al infanoj en la lernejoj.

kiel antaŭe vi jam legis, skeg organizos kune kun atomo la renkontiĝon en monistrol.

alia grava okupo por ni estas, komprenable la organizado de ekskursoj

kaj laste, la plej grava aktivaĵo estas la preparo de hejs juneco.

---

**ĉu vi sciis ke...** (laŭ unicef)

- kostas tiom armi kaj trejni soldaton kiom garantii la edudadon de 80 infanoj.
- la mono elspezita por fari submarŝipon estus sufiĉa por konstrui novajn 450.000 loĝejojn.
- kostas tiom fari militaviadilon, kiom ekipi per medikamentoj 40000 apoketojn vilaĝajn
- islando ne havas armeon nek alian specon de trupoj. kiom mi scias neniu invadis ĝin

*esperanto por monda paco*

☺


!
GNJJJ
JU,SU
KI, KIO OKAZAS ?
JUUPI
GŬAU !
!
NE, NE, NE ?
BŬA !
ZAP
MARAT-AERO
Jalf
Joan Felip '87

# NI VIVAS

## saluton ☺

**EKDE** ĉi numero, hejs-juneco ekiras novan vojon. la armeservo devigis miguel-angel transdoni al alia masoĥisto la suferigan taskon redakti e-o revuon. tiun defion mi prenis nesciante kiom, ĝi kumportas, da kapdoloroj, ĉefe por eldoni la unuan numeron.

pro la trajtoj de la nova hejs-juneco ni povas diri ke ni trovis oron, sukcesante ke la urbestraro de santa coloma de gramenet disponigu al ni sian presejon. pri tio ni parolos en alia paĝo de la revuo. bedaŭrinde ankoraŭ mankas al ni trovi rimedojn por munti ĝin bonkvalite. sed "tute ne gravas". iom post iom ni klopodos plibonigi ĝian aspekton kaj ĝian enhavon.

kiel vi konstatos ĉi numero ne enhavas multajn novaĵojn. mi sola, ja ne kontrolas la tutan hispanan movadon. pro tio, mi petas vian kunlaboron. ĉiu federaciiĝinta asocio disponos po unu tutan paĝon (aŭ pli) por rakonti kion ajn. sed atentu: hejs-juneco temos nur pri movadaj aferoj, pri ĉio kio iamaniere rilatu kun e-o.

kaj kio do okazos kun la rakontoj, sciencaj artikoloj, politikaj opinioj, k.c.? por tiuj kunlaboraĵoj naskiĝas la kultura organo de hejs: "la mano". ĝi estos eldonata en madrido kaj ĝia redaktoro estos georgo kamaĉo.

do atentu bone. la afero estas tia: pri movadaj aferoj (hejs-juneco) sendu viajn informojn kaj opiniojn al mi, kaj pri kulturaj aferoj ("la mano") sendu rekte al georgo.

revenante al hejs-juneco, mi esperas ke ĝi aperos pli ofte ol kutime. ĉio dependos de la necesoj pri informoj. la lingvaĵo estos prefere facila, ĉar ni devas atenti pri la komencantoj. vi povas uzi "la mano"-n por lingve ludi kaj pirueti. tamen hejs-juneco konservos sian bonan humoron por ke, kune kun la nova aspekto, la legado estu pli agrabla.

ne necesas diri ke ĉia kritiko estos bone akceptata, jen favoraj jen malfavoraj (tamen prefere la favoraj).

kaj post tiu serioza prezentado vi povas liberigi vin de viaj problemoj kaj ĝui la "mirindan" hejs-junecon. ĝis baldaŭ.



NOMO: jesuo

AĜO: la plej bona, 22

LANDO: la mondo

PROFESIO: legisto por elektrokompanio

ALIAJ OKUPOJ: lernas por kinoaktoro kaj instruas eternajn/komencantojn.

HOBIOJ: biero, sekso kaj roĥnrolo

(konitaĵoj trasercitaj far la sekreta departamento de atomo).

# ĉiujare feriu esperante

*INTERNACIA FESTIVALO DE AMIKECO
jun.17-jun.22, Płock
Pola Esperanto-Asocio, Krzywoustego 3, PL 09-400 Płock

*JUNULARA ESPERANTISTA PACRENKONTIĜO "JEPRE-87"
sep.17-sep.20 Karl-Marx-Stadt
Christian Papenmeier, Obere Hauptstraße 104, Oelsnitz DDR-9156

*NOVEMBRA JUNULARA FESTIVALO
nov.28-nov.30, montaro Ozren apud Tuzla
NJF Esperanto-Junularo, Dom mladih, R.Vokića 2, YU-75000 Tuzla




*TRADICIA INTERNACIA JUNULARA SEMINARIO
sep.28-okt.04, Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica
Internacia Esperanto-Kursejo, P.K.791, BG-1090 Sofio

*43a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO
jul.17-jul.24, Krakovo
Pola Esperanto-Junularo, str. Jasna 6, PL 00-013 Varsovio

*POTSDAMA SOMERA ESPERANTO-TENDARO "POSET-87"
aŭg.22-aŭg.29, Potsdamo
Brigitte Raabe Sulzbacher Steig 1, Staaken, DDR-1546

AH!

*ADIAŬO DE LA SOMERO
sep.18-sep.20, Międzyzdroje
Pola Esperanto-Asocio, poŝtkesto 14, PL 70-358 Szczecin 3


*MEZLERNEJAJ LABORTENDAROJ EN SZENTENDRE
dufoje: en julio kaj en aŭgusto
HEA Departementa Komitato, Szamuely u.47 fsz.3, Budapeŝto, H-1093

*INTERNACIA FESTIVALO PRI TURISMO, KOMUNIKADO KAJ KULTURO
okt.11-okt.19 Karakaso
Venezuela Esperanto-Asocio, Apartado 47675, Caracas 1041A

*POSTFESTIVALA TURISMA FERIADO
aŭg.10-aŭg.17, lagoj de Plitvice kaj Adriatika marbordo
Kroatia Esperanto-Ligo, Amruševa 5/I, YU-41000 Zagreb

# renkontiĝo HEJS' 87

## madrido.



jam de antaŭe mi esperis ke mi havos trankvilan paskon vizitante madridon (unu el miaj preferataj urboj) kaj samtempe iom renkontiĝi kun aliaj hejsanoj, kiujn mi ne vidis de antaŭlonge. sed fik´, kia frenezumado en madrido!. malgraŭ tio ke ne ĝuste temis pri la tradicia renkontiĝo, sed paralelaj aktivaĵoj kun la 47ª hispana kongreso de e-o, venis sufiĉe da gejunuloj (atentu, multaj komencantoj). ni povis tranokti senpage en la liceo. tien alvenis baskoj, aragonanoj, katalunoj, andaluzoj kaj kantabroj.

la programo de hejs komenciĝis per sin-prezento la jaŭdon vespere. tio okazis tuj antaŭ la interkona vespero. poste ni sukcesis ke sub la efikoj de la sangrio (bravo por la ĉestanoj kiuj ĝin donacis al la kongreso) pluraj homoj fariĝis protektantoj. cetere tiu interkona vespero iĝis nokto kaj poste frumateno, en huertas (ĝi estas strato kun multaj amuzejoj por gejunuloj).

la vendredon estis labortago por ni. okazis la ĝenerala kunveno de hejs, en bolanta temperaturo, ne pro la diskutoj sed pro la varmego ŝvebanta en la biblioteko kie ni kunvenis. aprobata estis la financraporto prezentita far alberto. se iu volas scii pri tiu raporto kontaktu kun la centra oficejo. poste oni prezentis la jarraporton kiu demonstris ke la nova sistemo hejs pri federaciiĝo bone sukcesas kaj oni atendas tre bonajn rezultojn el tio. dumkunvene federaciiĝis jesa (junulara eista societo aragona). bonvenon al ili!.

georgo kamaĉo parolis pri la rolo kiun devas ludi hejs en la najbaraj landoj kie estas esperantistoj sen memstara junulara organizo, t.e. maroko, alĝerio, portugalio, ktp. ĉu eblos nova renkontiĝo por ĉiuj ĉi landoj? ni vidos kiel marŝos la afero.

alia afero, georgo reprezentos hejs en la junulara krakovo. oni parolis ankaŭ pri ebla ijk en hispanio, konkrete en sevilo.
sed pri tio oni parolos dum la vintra kunveno.

post la ĝenerala kunveno okazis la drinkemula kunveno en la fama amuzejo "aurrera", tie ni kantis baske, trinkis andaluzie kaj fine dancis angle. tie ni altiris la atenton de multaj gejunuloj kiuj demandis nin pri nia kongreso kaj pri e-o ĝenerale.

sabaton tagmeze malgraŭ nia laco okazis la dua kunveno de hejs. oni pritraktis la starigon de

instrua komisiono. ĝia apero povos okazi dum la venonta vintra kunveno, kiu cetere okazos denove en madrido septembre. hejs subvencios vojaĝon al ĉiu komitatano partoprenonta. alia decido estis la preparo de hejs renkontiĝo en katalunio. ĝi okazos en monistrol de montserrat (barcelona) de la 31-a marto ĝis la 4-a aprilo, kiel tradicie dumpaske.

dum ni kunvenis aliaj ekskursis tra madrido. ili vizitis la zoon kie ili babilis kun ĝirafoj, ursoj kaj ĉinpanzoj. la krokodiloj malaperis timigitaj de la esperantistoj. en la vespero ni renkontiĝis en la teatrejo kie estis ludonta bulgara e-o' teatro. ĝi estis unu el la plej bonaj programeroj. tre amuzaj prezentoj luditaj bonkvalite far profesiaj geaktoroj. longdaŭra aplaŭdado post la prezento.

estis la nokto de la junulara festo. amase ni iris al trinkejo cedita por ni solaj, kie ni diboĉis manĝante kaj trinkante. aduriz kaj mike sadler demonstris al ni kiel bele ili kantas. post kelkaj bieroj ĉiuj ni kantis, sed ne finiĝis tie la festo. ni decidis denove viziti "huertas". survoje ni kantis, mi almenaŭ intencis, "sevillanas" kaj "jotas". la festo finiĝis je la 4a aŭ 5a horo matene.

la dimanĉon ni ne povis preteratenti viziton al la populara "rastro". nekredebla kiom da homoj povas promeni tra tiuj stratoj. vere ĝi estas nepre vizitinda. en la kongresejo okazis interesega kolokvo pri iberaj lingvoj prezidita far william auld. dum la prelego ekestis iuj disputetoj. ĝin partoprenis du junuloj: abel montagut pri kataluna kaj alberto franco pri hispana. en la vespero estis la adiaŭo.

ni promenis tra madrido trankvile babilante pri la renkontiĝo, pri kion ni faros, interŝanĝante adresojn, ktp.

la dimanĉon estis du ekskursoj: unu al toledo kaj alia buse tra madrido. sed ja mi pri neniu el ili povas paroli ĉar la unuan mi ne partoprenis kaj la duan mi pasigis dormante en la autobuso kune kun aliaj pro la lacego de la antaŭaj tagoj. tiun tagon post la akceptado de la urbestraro ni ĉiuj foriris tre lacaj kaj kontentaj.

estis kelkaj anekdotoj kiujn mi forgesis rakonti, ekzemple kiam ni decidis iri al la diskoteko (ĉiu kongresano havis senpagan enirbileton), oni ne permesis eniron car, laŭ ili, ni ne vestis "dece". do ni decidis iri al alia loko: orense, ankaŭ fama amuzejo en madrido kie ni tuj senpage eniris diskotekon.

alia anekdoto okazis kiam ni iris al la liceo ne portante la ŝlosilon. interne estis dormanta iu persono tiel profunde ke li ne aŭdis la sonorilon, do mi devis iri al la alia flanko de madrido kaj veki georgon je la 2,30 matene por preni lian ŝlosilon.

nu, entute mi povas diri ke mi travivis tre agrablan renkontiĝon. mi esperas ke la venontjaran en monistrol estos ankoraŭ pli sukcesa.

junulo, ne restu pasiva kaj partoprenu junularajn renkontiĝojn. vi vivigos la movadon kaj samtempe amuziĝos.

do, ĝis monistrol.

jesuo

## fariĝu membro jam!

hispana esperantist(in)o, hejs bezonas vin pli ol neniam. por havi fortan movadon en nia lando necesas multaj membroj. ne restu pasiva. ankaŭ vi estas grava por la movado.


kiel fariĝi membro?
se vi estas malpli ol 26jara, vi devas membriĝi al hispana e-o federacio; sen plia pago rekte vi estos membro de hejs.
sendu leteron kun viaj konitaĵoj al
hispana e-o federacio
carreras candi, 34-36
08028-barcelona (catalunya)

kun samtempa pago de nur 1000 ptoj
kiel jara kotizo al
caja de pensiones para la vejes y el ahorro. libreta 2303-26
agencia 436 (riera blanca)
08028-barcelona

---------

atentu: se vi estas pli ol 26jara kaj vin sentas juna aŭ volas helpi nin, vi devas sendi vian konitaĵojn kaj nur 1000 ptojn al la centra oficejo
oficina central de h.e.j.s.
sol, 75 tfno(954)415991
41003-sevilla (andaluzio)

ni dankas vian kunlaboron




## monistrol

skeg, la sankta kolomba e-o grupo organizis la pasintan 24an de majo, junularan kunvenon en la JER en monistrol de montserrat. la celo estis pritrakti la staton de la junulara movado en katalunio kaj la organizado de la 12a hejs-tendaro por la jaro 1988, okaze de la 20a datreveno de l' inaŭguro de l' "junulara e-ista restadejo". ĝi estis inaŭgurita en la jaro 1968 okaze de la 24a ijk de tejo en taragono.

partoprenis en tre bona etoso gejunuloj el barcelona, sabadell, olesa, esparraguera, santa coloma kaj l'hospitalet de llobregat. iuj venis la sabaton, do ni povis iom ekskursi kaj amuziĝi nokte ludante per e-o. poste, la dimanĉon 24an venis la aliaj. dum la kunveno evidentiĝis laboremo de pluraj gejunuloj. do, mi esperas ke ne estos multaj problemoj por la organizado de hejs-tendaro. oni eĉ parolis pri ebla programo.

oni decidis prepari pli oftajn kunvenojn por ke la e-istoj en katalunio ne troviĝu tiel disaj kiel ĝis nun, kaj kunigi la rimedojn de la grupoj por propagando, eldonoj, festoj, k.c. ĉar malgrandaj grupoj, kun malgrandaj rimedoj, ja malmulton povas fari se ili agas solaj. la tago finiĝis per komuna amikeca manĝado kvazaŭ festeto. ni ĉiuj foriris kun la deziro baldaŭ rerenkontiĝi.

jesuo

---

*

-kiu estas la plej akirinda besto?
-la kato
-kial?
-ĉar sufiĉas havi du el tiuj bestoj por riĉiĝi, t.e. por posedi dukatojn!

-avo, kie estas la pireneoj?
-mi ne scias, demandu al via panjo kiu ĉiam gardas ĉion.

la paciento signalante la stomakon
-doktoro mi sentas doloron ĉi tie
-do, iru tien

# legante

en la mirinda mondo de la kino; donĉo ĥitrov. eld. hungara e-ă asocio.

la ŝatantoj de la kino vere ĝuos ĉi verkon de la esperanta literaturo pri kino. la aŭtoro estas sufiĉe konata en esperantaj kaj kinematografiaj medioj. li estas la prezidanto de i.l.e.f.(internacia ligo de esperantistaj kino-foto-magnetofon-amatoroj). jam de infano donĉo inklinis al la kino, kiam en sia subtegmento organizis filmprojekciojn por siaj amikoj kaj knaboj ŝamkvartalaj. li havis firman decidon: fariĝi iam filmisto. li sukcesis. li komencis, kiel studento de ĵurnalistiko, laborante en redakcio de kina revuo. poste partoprenis en filmaj festivaloj, kunlaboris kun gazetoj, radio kaj televido, kaj filmadis. nun, ĉi konata filmisto aperigas en e-o la tradukon de sia libro eldonita bulgarlingve en 1971. temas pri la historio de knabo elektita por ĉefroli en filmo, kaj samtempe la aŭtoro haltas por ekspliki kelkajn konitaĵojn pri historio de la kino, tekniko, ktp. ĝi estas verkita en tre agraba lingvaĵo kaj la rakonto senvole enirigas vin en filman studion.

je la fino, aperas esperanta filmterminaro, iom resuma, kvazaŭ bazo por la nova verko de donĉo: esperanta televida kaj filma terminaro.



## Serĉu la vortojn


↓↑ ⇄ ⤢

| | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| k | a | n | t | a | b | r | i | o | ĉ | b | a | o |
| a | a | r | a | g | b | n | o | o | o | f | n | r |
| n | k | s | e | ĵ | j | s | i | i | ŝ | o | v | u |
| a | m | o | t | r | g | r | g | a | e | o | a | d |
| r | t | r | c | i | d | e | h | l | o | i | l | a |
| i | l | a | e | t | l | o | o | z | i | z | e | m |
| o | o | v | s | a | v | i | n | a | n | u | n | e |
| i | r | a | g | b | l | c | o | j | u | l | c | r |
| k | a | n | e | a | u | r | p | m | l | a | i | t |
| p | e | l | t | s | i | u | h | ĉ | a | d | o | s |
| ŝ | l | s | u | k | a | m | e | z | t | n | i | k |
| m | a | d | r | i | d | o | k | i | a | a | ĉ | e |
| k | b | v | t | o | ñ | o | i | r | k | o | l | o |

en ĉi giganta literaupo vi trovos la nomojn de la 17 hispaniaj landoj. kiel via geografio?

## ludante

por perfekte mastri la numerojn estas mirinda ludo: la kruela sep. ĉiuj partoprenantoj sidas ronde. oni komencas diri orde la numerojn sinsekve (unu, du, tri...), kaj ĉiu ludanto diras nur unu. sed atentu: kiam aperas la sep, iu oblo de sep (14, 21, 28...) aŭ numero finiĝanta per 7 (17, 27, 37...); la ludanto devas diri iu ajn vorto (ekz. ne) kaj ŝanĝiĝas la direkto, (ekz. se oni komencis de live dekstren, post diri ne la direkto estos dekstre liven, kiam denove aperos ne, denove la direkto estos live dekstren). post tri erarojn la ludanto devas lasi la ludon. vi ludu en viaj kursoj, samtempe kaj lerros kaj amuziĝos.




finfine aperis! la kasedo de amplifiki "tute ne gravas" pruvas al ni ke la esperanta muziko aktualas kaj bonkvalitas. temas pri la plej konata rokensemblo en esperantio. ke ĝi ne estu la lasta. bravo amplifiki !

vi jam vidis la novan hejs-junecon. certe vi pensos ke ĝi estas malriĉa pri enhavo. mi ricevis ankoraŭ nenian kunlaboraĵon de la membroj, grupoj aŭ asocioj, tial ke oni ne konis la novan adreson kaj eble mi ne donis sufiĉan tempon por ilia alveno. la revuo ja ŝajnas iom kataluneca. komprenoble sen informoj mi parolu pri tio, kion mi konas. ne gravas. la venonta numero, tion mi povas aserti, estos multe pli interesa kaj havos pli da paĝoj.

la revuo havos pli malpli la jenajn sekciojn, do pripensu al kiu vi sendu ion ajn:

- prezento
- ĉeftemo
- sin prezento de ĉiu esperanto grupo (ĝi povas ampleksi unu paĝo maks.)
- sekcioj por ĉiu federaciiĝinta asocio (ĝeneralaj aktivaĵoj en respektivaj landoj. en ĉi sekcio aperu la informoj de la e-o grupoj, kiel kursoj, festoj, renkontiĝoj, demarŝoj, ktp.)
- recenzoj (sendu ĉiujn konitaĵojn pri la libro recenzita)
- distroj (sendu spritaĵojn desegnajn aŭ tekstajn, rebusojn, litersupojn...)
- internacie (eksterlandanoj informu hispanojn pri kio okazas en viaj landoj)
- ĉio ajn kio iamaniere rilatu al e-o.
- informoj pri kongresoj kaj renkontiĝoj.
- opinioj pri kio ajn en la e-o movado.
- kaj plej grave: vian opinion pri la revuo. sincere diru kian vi volas ĝin. kion vi ŝanĝus, kio plaĉas al vi...

ni faru la plej bonan junularan e-o revuon.

## speciale*

ĉi lastan paĝon mi volas dediĉi al josep miquel lacasta. certe vi ne konas lin. li estas la homo kiu aŭtorizis la senpagan presadon de nia revuo hejs juneco en la urbodomo de santa coloma de gramenet. li estas skabeno pri instruado kaj kulturo. malgraŭ ke li ne estas esperantisto (ankoraŭ) li tre bone simpatias al nia movado, samkiel la urbestro lluis hernández. josep miquel, el ĉi paĝo ricevu nian sinceran dankon.

---

lluis hernández, urbestro de santa coloma de gramenet:

esperanto ja ne estas utopia elpensaĵo el la imago de homo unika. esperanto estas realaĵo kun estonteco. kaj por konfirmi tiun aserton, endas scii, ke, en ĉiu lando de la mondo, ekzistas inteligentaj homoj kiuj lernas esperanton kaj disvastigas ĝin, kreante centrojn por studado kaj esplorado de ĝiaj disvolviĝo kaj lingvistika tekniko.

la esperantistoj ĉiam impresis min pro unu fakto: ilia penado ebligi (per komuna lingvo) la interhoman komunikadon. ĉar, malantaŭ esperanto, troviĝas solidara priokupado: atingi ke ĉiuj personoj, sendepende de sia deveno aŭ kulturo, povu interkompreniĝi kaj pace kunvivi. tiu ĉi lasta tasko meritas (senrezerve) nian aplaŭdon.

---

SANTA COLOMA (junulara urbo)